Nia kurso konsistas nun el 3 ŝtupoj: = elementa pere de "M°11"; = duagrada, pere de "M°12"; = triagrada pere de "Por la Praktikantoj" kaj "Paŝoj al plena posedo"... Ni planas nun krei 4a-gradan pere de la verko de A. A. RIBOT, laste reeldonita de la Kulturdomo GRESILLON (titolo: "Preparado al la Atesto pri Kapableco". Ni informos pri tio en la venonta INFORMILO, ĉar tiu preparado postulas la studon de diversaj verkoj, kiujn la libroservo nun recenzas por prepari katalogojn de aĉeteblaj libroj por la eventualaj kandidatoj.

Jen niaj kunlaborantoj por la nuna lernjaro. Gvidas gelernantojn (komencantojn): P. DENIS (Bar-le-Duc), A. GROSSMANN (Baldersheim), P. ETIENNE (Malzéville), R. DEGRELLE (Tomblaine), G. GRENIER (Foug), E. LUDWIG (Stosswihr), R. GUILLAUME (Pont-St-Vincent), B. WICK (Strasbourg), J.-L. THIBIAS, C. ROUX (Vandoeuvre), C. BUSSER (Stosswihr) J.-P. COLNOT (Laxou). Gvidas en la 3a-grada: P. ETIENNE, R. DEGRELLE, G. GREINER, E. LUDWIG, C. ROUX, JP COLNOT. Gvidos la 4an gradon R. DEGRELLE.

Kunlaboras por varbado, aperigo de komunikoj, respondo al informpetoj: Sin° NAU (Montigny-lès-Metz), Sin° BERNEZ (Chaumont), Sr° REMY (Luxeuil) kaj ĝis nelonge nia forpasinta amiko CROCHET (Epernay). Por anstataŭi lin ĵus fariĝis delegito de nia kurso por Marne (51) malnova lerninto de nia kurso, Sr° Fernand NEEL, en St-Martin-sur-le-Pré.

J.P. COLNOT

Sekve al la kampanjo lanĉita antaŭ unu jaro por varbi por nia PK° jen do la lastaj ciferoj pri la lasta lernjaro por kompletigi la raporton aperintan en LA INFORMILO n° 54.

Sin° NAU (Montigny-lès-Metz) varbis 9 gelernantojn kaj do ricevos abonon al la gazeto "MONATO" por 1987. Sr° CROCHET (Epernay) varbis 5 homojn, Sr° BARRIER (Hochstatt) varbis 3, Sin° BERNEZ (Chaumont) varbis 2, Sin° ROUX Sr° LUDWIG kaj Sr° GROSSMANN varbis po 1. Gratulojn al ĉiuj!

Mi memorigas, ke la kampanjo daŭre funkcias por 1987. Afiŝoj kaj cirkuleroj pri la PK° kaj flugfolioj pri E° estas disponeblaj. Mendu ilin, indikante la deziratan kvanton, al: J.P. COLNOT = 15, Rue de Lavaux, 54000 NANCY.

NIAJ AMIKOJ EN LA REGIONA GAZETARO

Dum la lasta lernjaro ni dissendis 66 komunikojn pri nia Perkoresponda Kurso al la regiona gazetaro, tio signifas po 5 aŭ 6 komunikoj al 12 gazetoj. Ni povis kontroli la aperon de nur 32 el ili.

Enpresis 6 komunikojn: L'EST REPUBLICAIN (Nancy) kaj LES AFFICHES DE LA HAUTE-SAONE (Lure). Mi aldonu, ke por L'E.R. mi devis mem viziti ĉiufoje la redakcejon en Nancy por certigi la aperon. "Les Affiches" ĉiam subtenis Esperanton. Enpresis 5: LE REPUBLICAIN LORRAIN (Metz) dank' al Sin° Nau kaj L'ECHO DES VOSGES (Gérardmer) dank' al Sr° Lambert. Enpresis 4: "Les Affiches-Moniteur des Soumissions" (Strasbourg). Krome tiu gazeto, tre favora, sen das ekzempleron de la koncernata numero... Dankegon! Enpresis 3: L'UNION (Reims) dank' al Sr° Crochet. Enpresis 2 (resumitajn): L'ALSACE (Mulhouse) enpresis ŝajne nur 1 (kaj ege resumitan), DERNIERES NOUVELLES D'ALSACE (Strasbourg). Generale tiuj tre resumitaj komunikoj alportas preskaŭ neniun leteron.

Mi povis kontroli neniun aperon en LE NOUVEL ALSACIEN (Strasbourg) kaj LA LIBERTE DE L'EST (Epinal) sed ĉar alvenis nur 2 informpetoj entute el 67, kaj 4 el 88, oni povas supozi, ke ili nenion enpresis. Mi sendis krome komunikojn al LA HAUTE-MARNE LIBEREE kaj almenaŭ 1 el ili (kun adreso de Sin° Bernez) aperis en... EST REPUBLICAIN. Pri la nuna lernjaro mi povis kontroli ĝis nun aperon de 4 k. en REPUBLICAIN LORRAIN, po 2 en L'EST LES AFFICHES de Haute-Saône kaj LES AFFICHES-MONITEUR, 1 en L'UNION kaj po 1 tre (tro!) resumita en L'ALSACE kaj DNA. Kiu leganto de "La Informilo" povus zorgi pri aperigo de komunikoj en sia loka gazeto? (Temas ĉefe pri DNA, Le Nouvel Alsacien, La Liberté de l'Est, L'Alsace, kiuj ne aperigas, aŭ tre malbone, niajn komunikojn. Kiu povus liveri al mi tiujn aperantajn en La Liberté de l'Est kaj Le nouvel Alsacien? Mi memorigas, ke mi kolektas (por nia Federacio, UFE kaj SAT-Amikaro) ĉiujn artikolojn aŭ komunikojn pri E° en nia regiona gazetaro; lastjare ili ampleksis 22 paĝojn (formato 21x29).

Dankon al ĉiuj kontribuantoj!

J.-P. COLNOT
15, Rue Lavaux, 54520 LAXOU

NEKROLOGO

La 4an de novembro mortis en EPERNAY, 83-jara, nia amiko Maurice CROCHET. Antaŭ la lasta mondmilito li tre aktivis por esperanto, li estis longe delegito de UEA kaj antaŭ kelkaj jaroj, kiam UFE petis nin prizorgi en la kadro de nia federacio la departementon Marne, li estis unu el la tre malmultaj marnaj samideanoj, kiuj konsentis kunlabori kun ni. Tion li faris tre vigle, zorgante ĉefe pri nia perkoresponda kurso. Foje li eĉ pagis el sia poŝo anoncon en la gazeto "L'UNION", tiel malfermante al ni la paĝojn de tiu gazeto, kiu de tiam ĉiam konsentis enpresi niajn komunikojn. Ĝis la lasta oktobro la adreso de Sr° CROCHET aperis en la komunikoj kaj li respondis la ricevitajn informpetojn. Multaj el ni renkontis lin dum niaj staĝoj kaj kongresoj, kiujn li ĉiam fidele partoprenis. Li ĉiam vivis en niaj memoroj.

Jean-Paul COLNOT

La 6an de novembro, post longa senkonscio, René BASTONG forpasis en Parizo. Meze de septembro li estis grave vundita de bombo lanĉita de teroristo. R. Bastong transprenis la respondecon de INTERNACIA ESPERANTO-KLUBO AUTOMOBILISTA post la forpaso de J. GUILLAUME. Okaze de la U.K° en Aŭgsburgo mi pridiskutis kun li pliajn rimedojn por motivigi niajn samideanojn aliĝi al IEKA. Al liaj edzino kaj infanoj ni prezentas niajn kondolencojn.

Pol DENIS

"... La kurso kun Sr° Denis estis samtempe interesa kaj amuza. Ni legis "Ĉu rakonti novele?", krim-noveloj originale verkitaj de Johan Valano. Ni trovis kelkajn inventaĵojn de la aŭtoro, kiuj estas tre interesaj pri la lingvistiko. Tiam mi deziris scii sufiĉe Esperanton por ankaŭ mem inventi. Mi sentis, kiom Esperanto lasas liberecon al la parolanto, anstataŭ devigi lin sekvi nur ekzistantajn formojn.

Mi renkontis kun granda plezuro diversajn homojn: kelkajn eksterlandanojn. Mi aŭdis Esperanton parolatan de Anglo kaj de Nederlandanoj. Ilia prononco interesis min. Eĉ mi parolis kun Indoneziano, kiu rakontis interesan infanagon. Mi ankaŭ renkontis iujn, kiuj kutimas partopreni tiun staĝon por prizorgi sian uzadon de la internacia lingvo. Mi esperas denove renkonti ilin proksiman fojon. Tiu staĝo estis tre agrabla kaj refortiga por izolituloj, kiel mi. Mi renkontis alian izolitan samideaninon.

Mi ŝatis la teatron vesperon. Mi multe admiris la econ teknikan de la enscenigo kaj de la aktoroj. Bedaŭrinde mi ne sufiĉe bone komprenis. Mi facile sekvis la unuan tekston, sed aliaj estis tro malfacilaj por mi. Feliĉe mi vidis la gestojn. Mi ankoraŭ havis grandan plezuron: mi vizitis Nancion! Mi ne konas la regionon, mi volis viziti de longe, sed mi neniam faris. Do mi vizitis tiun belan urbon kaj mi povis aŭdi dufoje la komentojn, unue en franca lingvo, poste en Esperanto...

Mi opinias, ke en la proksima staĝo mi provos paroli pli multe..."

Renée-France MARTINATO
70300 LUXEUIL

☆☆☆

La Nederlanda karavano konsistis el 7 personoj. Pro la granda distanco ni jam alvenis vendredon vespere. La unua -por ni agrabla!- surprizo estis langkaresa kaj ampleksa vespermanĝo ĉe Madeleine kaj Catherine ROUX. Kune kunfrancaj kaj angla samideanoj ni pasigis neforgeseblan vesperon en amika etoso. Antaŭ ol veturigi nin ĝis nia loĝejo Madeleine gvidis nin per aŭto en Stanislas-Placon, kie la imponaj, orumitaj palaco-kradoj estis bele iluminitaj.

La "MAISON de L'ASNEE" montriĝis ne domo sed grandega monaĥejo situanta en bela parko. Tra longegej koridoroj ni atingis niajn komfortajn ĉambrojn kaj antaŭ ol endormiĝi admiris admiris la vidaĵon sur la NANCY-aj noktaj lumetoj. Post matena vizito al la urbo kaj tagmanĝo en granda magazeno ni finfine povis konatiĝi kun la aliaj partoprenantoj, kiuj estis alvenantaj posttagmeze. La proksimume 60-persona partoprenantaro dividiĝis en kvar grupoj. Ĉiu trovis kurson laŭ intereso kaj lingvokapablo. Mi partoprenis en la kurso "D", en kiu Ed. BORSBOOM, la aŭtoro de la konata libro "VIVO DE LANTI", prezentis pri tiu temo prelegserion. Tiomis interesatoj, ke apenaŭ sufiĉis seĝoj. Multaj esperantistoj jam konas Ed. Borsboom kiel inspiran preleganton kaj li plene sukcesis intereskapti la publikon.

Krom la seriozajn oni ankaŭ povis ĝui distrajn programerojn.. Ni havis okazon spekti "TESPA", teatro-trupon el PARIZO, en 3 unu-aktaĵoj. Alia fenomeno estis la loterio, en kiu ĉiu loto rezultis en premio! Nepre menciindas la riĉa libroservo, kiu funkciis dum la tuta semajnfino. La staĝon finis komuna tagmanĝo. Dume, unu el la organizantoj disdonis faldfoliojn pri Esperanto al la ne-esperantistaj grupoj en la manĝejo.

Dum la lokaj esperantistoj vizitis estrarkunsidon, ni aliĝis al grupo, kiu rigardas la urbon. Nin gvidis la urba arkitekto mem! Liajn tre detalajn klarigojn tradukis kuraĝe franca esperantisto. Pro la alvenanta malvarmo, fine de la promenado, ili ne plu ricevis la atenton, kiun ili meritis. Parto de la promenintoj iris sin varmigi en te-ejo per varmaj kafo kaj ĉokolado.

La lastan vesperon ni pasigis kune, kiel la unuan, sed nun en loka restoracio. Ni honoris Madeleine kaj Catherine, kiuj tiel bone organizis ĉi-tiun staĝon kaj tostis per ĉampanjo por festi, ke du samideaninoj sukcesis en la unua-grada ekzameno.

Mi pensas, ke mi parolas nome de la aliaj Nederlandanoj, dirante, ke ni estis kontentaj pri tiu-ĉi stago. Ni kore dankas ĉiujn, kiuj kunhelpis al ĝia sukceso kaj esperas foje reveni.

Saskia VEEN
NL-MAASTRICHT

FERII EN ESPERANTUJO

De longe mi aŭdis paroli pri la esperanta kulturdomo "Gresijono", apud BAUGE, en la departemento Maine-&-Loire, en Francio. Al Pekino ne irante, mi decidis pasigi du semajnojn en tiu loko tiom laŭdita. Mi sukcesis decidi mian karan edzinon akompani min: kompreneble ne estis malfacile, ĉar tiuj semajnoj estis la nuraj somerferioj por mi! Ambaŭ do, ni malkovris la beletan kastelon en granda parko kun altaj arboj kaj subombra lageto. Ĉirkaŭ kvindek samideanoj travivis ĉi-tie agrablajn momentojn, jen legante, jen ludante, jen studante.

La platnumero de multaj aŭtoj indikis, ke Nederlandanoj, Angloj kaj Germanoj frekventis la Domon; poste mi eksciis, ke trajno veturigis ankaŭ kelkajn aliajn Eksterlandanojn. Pluraj familioj ĉeestis kune kun la infanoj, kiuj donis al tiu kvieta kastelo junulan etoson.

Supergrimpinte la majestan peronon, akceptis nin Sr° kaj Sin° BABIN, la "provizoraj gepatroj" de tiu-ĉi granda Esperanta familio. Post kelkaj minutoj ni ekokupis belan ĉambron kun granda lito kaj balkono sur la parko. Okaze de la unua rendezu en la mangoĉambro, ni konatigis rapide kun pluraj rezidantoj. Ĉetable ni respondis al la multnombraj demandoj: kiuj?... de kie?... ktp!...

Post libertempo ni partoprenis kurson: tute libere mia edzino elektis tiun, kiu estis gvidata de Sin° VINCENT kaj mi eniris la grupon de Sr° MOIRAND. Estis ankoraŭ kursoj por komencantoj kaj por infanoj. Dum la vespero, la "Grezijonanoj" distriĝis per diversaj kulturaj aranĝoj: prelegoj, lumbildoj, teatraĵoj, ludoj, kantoj, ktp.

Ni ambaŭ ŝategis la restadon, ĉar nenio estis deviga. Ni rajtis ripozi en la ĉambro, viziti la ĉirkaŭaĵon, babilu kun la geamikoj aŭ ĉeesti la kursojn, tute laŭ nia propra bondeziro.

Vere agrablaj ferioj en Esperantujo!

François-Xavier
kaj Liliane GILBERT

D	Vjetnamio-Sovetunio	(Vjetnamio)	10
D	Vjetnamio: kiaj homaj tajtoj	Minh-kinh	8
FZ	Voĉo de l' silento (La)	HPB	15
F	Vojaĝo al faremido	Frigyes-Karinty	38
R	Vojaĝo al Kazohinio	Szathmari	61
N	Vole novele	Schwartz	71
V	Vortaro de esperantaj rimoj	Eldon. Iltis	22
E	Vorto kaj vortelemanto en E° (La)	Szerdahelyi	12
E	Vortstatistikoj esploroj	Vatré	18
E	Vort-teorio en Esperanto (La)	Saussure	36
D	Vortoj de Andreo Cseh	Eldon. Iltis	72
D	Vortoj de kamarado Lanti	X	20
D	Vualo de l' tempo	Sullivan	53
I	Winnie-la-Pu	Kellerman	20

DISKOJ = KASEDOJ

Baf!	Ĝanfranko	65
Bulgara rozo		85
Damjanov koncertas en Kanado		95
Danĝera ul'	Ĵak le Puil	65
De Pont-Aven al Varsovi'	Ĵak le Puil	65
Horo de opozicio		65
Floreto		55
Jubilea koncerto	Damjanov	85
Kontakto		65
Leviĝis nokte hela sun'	(disko)	20
Max Roy Carrouges		65
"METODO 11"	UFE	47
"METODO 12"	UFE	58
Nouveau Cours Rationnel	SAT	40
Per nia nura vol'	Suzanna	55
Poezio de la patrolo		65
Saluton		35
Tra la mondo	Tzaut	70
Venos liber'	Marĉela	65
Voĉo de la popolo (La)		51
Vojo (La)	Ĝanfranko	65

— KIEL AĈETI PERKORESPONDE ? —

- 1/ VI SENDAS MENDON AL LIBROSERVO
B.P. 23
F-54510 TOMBLAINE
- 2/ VI BALDAŬ RICEVAS LA MENDITAJN LIBROJN KUN FAKTURON
(LIBROJ + SENDKOSTOJ)
- 3/ VI TUJ PAGAS PER POSTA ĜIRO AŬ MANDATO AL
- Libroservo = CCP 2800-76 H NANCY - aŭ per bankĉeko
al Libro servo.

... mi legas... ci legas... li legas... ŝi legas... ni legas..

(8-paĝa kajereto = vi forprenu la 2 foliojn el la revuo kaj faldu ilin)

===== KATALOGO DE LA LIBRO-SERVO =====
(Decembro 1986)

La ORIENT-FRANCA KULTURA ESPERANTO-FEDERACIO proponas al siaj membroj jenajn librojn kaj kasedojn.

Ĉi-tiuj estas aĉeteblaj en ĉiu kongreso aŭ staĝo organizita de la Federacio, aŭ perkoresponde.

= la prezoj indikataj povas iomete ŝanĝiĝi =

KLARIGO

B	Bildstrio	F	Fabuloj, fabeloj	N	Noveloj, rakontoj	S	Scienco, tekniko
Bl	Biografio	Fz	Filozofio	P	poezio	T	Teatraĵoj
E	Movado, lingvaj studoj	G	Ĝeografio, turismo	R	Romanoj	V	Vortaroj, lernolibroj,
D	diversaĵoj	H	Historio	Rg	Religioj		legolibroj

=====

V	Abrégé de grammaire	Lentaigne	5 FF
E	Aktoj de la E°-Akademio (1963/67)		14
E	Aktoj de la E°-Akademio (1968/74)		27
E	Aktualaj problemoj de la nuntempa internacia vivo	Lapenna	32
P	Al abelujo ĝi flugas	Liiv	12
T	Amo de DANTO (La)	Trigve-Muller	38
V	Amuza legolibro en Esperanto	Lienhardt	45
V	Amuzaj dialogoj	Lienhardt	36
E	Analizo de la interrilatoj inter la blindularo kaj la diversaj socioj de la Esperantaj industriaj landoj	Stark	65
P	Angoro	Piĉ (Karolo)	66
P	Apenu buketedo	Bernard	40
B	Asteriks la Gaŭlo	Gosciny	35
R	Aŭli - rakonto pri knabeto	Adamson	38
G	Albumo pri Ĉinio	Ĉina E°-Eldonejo	24
R	Aventuroj de L.R.M. Stultulof (La)	Dorno	37
N	Bagatelaro	Rosbach	28
N	Bakŝiŝ	Newell	67
P	Baladoj el Asante	Latham	14
V	Barbro kaj Eriko	Schneider	7

R	Batalo de l' vivo (La)	Dickens	49	S	"	tekniko	SEC	24
D	Baza literatura krestomatio	H. E. A°	37	S	"	Ter-sciencoj (julio 1985)	SEC	24
N	Blanka sablo	? (Vietnamio)	5	T	Sen eliro - La respektema P.		Sartre	20
P	Blinda ermito	Caprile	24	R	Senlingvulo (La)		Korolenko	54
R	Bodil kaj la bando	Hansen	41	E	60 jaroj kun aldonaj konsideroj		Rizzo	16
I	Bonkora ŝjaŭdon	Mei-ĵing	15	D	Sesdek-oka...ĉu decida jaro?		Silfer	16
R	Boule de suif	Maupassant	49	D	Skiza historio de la Utao		Miyamoto	42
T	Brand	Ibsen	57	E	Skizo de la historio de la Esperanto-movado en LIONO		Vedrine	15
I	Brava kolombido	Ĉ. E° E°	10	G	Skizo pri Cinio		El Popola Cinio	10
D	Bukedo al vi	Ĉ. E° E°	10	R	Sklavoj de Dio		Gardonyi	32
P	Cent ĝojkantoj	Boulton	20	D	Socia romano en Esperanto (La)		Vatré	14
D	Centa Simio (La)	K E N	20	P	Soifo		Tarkony	45
N	Ĉiela birdo	Zsigmond Moricz	22	F	soleco		Catala	81
E	Ĉiu-ĉiun	Teo Jung	97	P	Somera sinfonio		Leenhard	19
R	Ĉu li bremsis sufiĉe?	Valano	40	R	Somermeze		Kuusberg	38
R	Ĉu li venis trakosme?	Valano	67	P	Sonetoj (La)		Sekspir	108
R	Ĉu ni kunvenis vane?	Valano	70	I	Sportistetoj		?	2,50
R	Ĉu si mortu tra-fike?	Balamo	50	P	Streĉita kordo		Kalocsay	50
R	Ĉu vi aŭdis tion?	Grenkamp	66	E	Sub la signo de la verda stelo		Aabyhoj	27
S	Ĉu vi konas la Teron?	Dudich	33	P	Sub stelo rigida		Porsteinn	24
R	Ĉu vi kuiras ĉine?	Valano	75	R	Suferoj de la juna Werther (La)		Goethe	117
E	Ĉegenero de W. Auld (La)	De Diego	15	N	Suno kaj pluvo		Riisberg	31
BI	De paĝo al paĝo	Tarkony	32	R	Sur la bordo		Nevil Shute	73
N	Dekdu piedetoj	Boulton	20	N	Sveda novelaro		Opo	35
G	Dek-ses urboj de Ĉinio	Ĉ. E°-E°	22	P	Taglibro		Goethe	25
D	Dialekto-dialektiko	Dalmaŭ	10	P	Teatra korbo (La)		Baghy	16
V	Dictionnaire Français-Espéranto	Léger-Albault	45	R	Tero de la homoj		Saint-Exupéry	108
V	Dictionnaire pratique d'Espéranto	S. A. T.	70	V	Tiel diru		Lentaigne	20
FZ	Diskurso pri la Metodo	Kartezio	39	B	Tinĉjo - La krabo kun oraj pinĉiloj		Hergé	35
P	Divershumore	Rejna De Jong	28	BI	Tolstoj		Lebrun	122
BI	Doktoro Esperanto (La)	Ziolkowska	20	N	Tonio Krüger		Thomas Mann	43
D	Danco ĉirkaŭ lokomobilo	Mats Traat	15	R	Tra dezerto kaj praarbaro		Sienkiewicz	73
R	Dr° Jekyll kaj Sr° Hyde	Stevenson	52	R	Trans la fabeloceano		Szilagy	10
P	Uoloro (La)	Ungaretti	22	R	Trezorinsulo		Stevenson	47
R	Dona Barbara	Gallegos	44	D	Tri rapsodioj		Szilagy	10
T	Don Juan Tenorio	Zorilla	65	R	Trigroŝa romano		Brecht	65
N	Du amasantaj noveloj	Storm-Escherich	8	N	Tri noveloj		Eichendorf	81
I	Du katetoj	Gantong	10	P	Trofeoj (La)		De Heredia	32
V	Dua legolibro	Bruggemann	10	V	Tu seras espérantiste!		Delaire	5
P	Dudek-kvar sonetoj (La)	Labé	34	P	Tutmonda sonoro		Kalocsay	160
D	25 jaroj	Auld	37	V	Universala legolibro		Fricke	14
P	Du el...	Boulton-Thorsen	89	N	Unu tago post la alia		Guglielminetti	98
RG	Ekumenismo kaj internacilingva problemo	Korytkowski	36	P	Urbo de terura nokto (La)		Thomson	16
P	Ekzilo kaj azilo	Emba	26	N	Vagado sub palmoj		Ribillard	17
F	Elektitaj fabeloj	Grimm (broŝur.)	80	E	Vendreda klubo		Dietterle	19
		(bindit.)	67	D	Verda relo (La)		?	61
F	Elektitaj fabloj	Krilov	50	R	verda robo (La)		Rosbach	46
E	Elektitaj paroladoj kaj prelegoj	Lapenna	81	P	Verdkata testamento (La)		Schwartz	39
D	Elingita glavo	Opo	24	D	Vereco-Distro-Stilo		Auld	58
P	El parnaso de popoloj	Grabowski	90	V	Vibraĵ momentoj		Rosbach	53
P	Elpafu la sagon	Sekelj	100	N	Virineto en bluo (La)		Mason Stuttard	60
P	El streĉita kordo	Kalocsay	7	P	Vivendo		Gabrielli	47
R	El Tero kaj etero	Julia Pioro	24	BI	Vivo de Zamenhof		Privat	51
I	Enkonduko en la librosciencan de Esperanto	Hauptenthal	12	G	Vjetnama socialisma respubliko		(Vjetnamio)	27

D	Parnasa gvidlibro	Waringhien	74	T	En maskobalo	Baghy	36
V	Paŝoj al plena posedo	Auld	57	P	En senvoja sovaĝejo	Jacob Maris	18
D	Pensoj kaj protestoj	Gaborit	20	E	Enciklopedio de Esperanto	Koseny Bleier	122
R	Perdita honoro de iu Katerina Blum (La)	Bŝil	48	RG	Enkonduko al ekumenaj problemoj	Wladislaw Miziolek	21
S	Perkomputila teksto-prilaboro	Koutny	81	T	Epifanio	Ŝekspiro	29
I	Petolema kaprido	Ĝang-Tong	10	P	Esperanto-Antologio	Auld	162
G	Pitoreska PEKINO	Ceng-Limin	14	E	Esperanto en perspektivo	Lapenna	230
V	Plena analiza gramatiko	Kalocsay-Waring.	130	E	Esperanto et Interlingua	Bernasconi	13
V	Plena ilustrita vortaro	Opo	290	E	Esperanto: lerneja eksperimento	Sonnabend	33
V	plena vortaro	Opo	70	RG	Esperanta meslibro	I.K.U.E.	5
N	Pli ol fantazio	Bogh-Hogstek	21	E	Esperanto - une approche		
P	Poemoj	Pavese	22		de la Langue Internationale	U.F.E.	10
D	Poeto fajrakora	Boulton	107	V	Esperanto por infanoj	Gladstone Salomon	10
D	Pola folkloro kaj popolokanto	Grenkamp		E	Esperantologiaj kajeroj	Zsuzsanna Varga	35
V	Por la praktikantoj	Babin	30	E	Esperantologiaj studoj	Wŭster	65
V	Poŝvortaro	Opo	18	E	Esperantologio kaj ties disciplinoj	Neegaard	16
FZ	Praĵnjaparamita hrjoaja sutro	Ueda Koko	9	E	Esperantonimoj	Ĝivoje	24
V	Praktika bildvortaro	Clark	30	R	Eta Princo (La)	Saint-Exupéry	85
P	Pretertempe	De Giorgi	45	D	Enkonduko al literatura kritiko	S.U.K.	50
RG	Prezo de la elaĉetado	Erwan-ar-Menga	40	FZ	Enkonduko en la kategorion		
FZ	Pri dubo kaj certeco	Pauli	39		de Aristotelo	Porfirio la fen.	27
E	Pri internacia lingvo dum jarcentoj	Drawter	81	F	Ezopa saĝo	Kalocsay	34
E	Pri lingvo kaj aliaj artoj	Auld	49	F	Fabeloj de la verda pigo	Beaucaire	54
E	Pri literatura kritiko	De Diego	53	V	Facilaj dialogoj	Lienhardt	24
E	Pri problemo de internaciigo de			F	Fabloj de Lessing	lessing	30
	scienc-teknika terminaro			F	Fajro sur mia lango	Derock	24
P	Primico	Drezen	49	V	Faktoj kaj fantazio	Boulton	97
BI	Profetino H. Konttinen	Tagor	28	T	Fatomaŝino (La)	Kokto (Cocteau)	40
P	Prologo	Sarlin	20	I	Feliĉa birdo (La)	Ĉ.E°-E°	10
P	Prologo	Mihalski	10	N	Fenestro kristala (La)	Pioro	78
R	Rabeno de Baĥaraĥ (La)	Chaucer	11	R	Fianĉo de l' sorto	Rosbach	85
R	Rabeno de Baĥaraĥ (La)	Heine/Zamenhof	13	D	Forto de l' vero (La)	Adi	10
S	Radioteknika artikolaro	Heine/Hauptenthal	30	RG	Francisko el Asizo	Doornik	54
V	Rakontu samideano	SEC	20	P	Frithjoi Sagao	Tegner	105
H	Reforma movado de 1898 (La)	Opo	31	E	Fundamento de Esperanto	Zamenhof (broŝ.)	32
R	Regulus	? (Ĉinio)	6			(bind.)	40
FZ	Rekta pensado	Lorjak	88	V	Gaja leganto	Schwerin	8
P	Renescenca periodo (La)	Pauli	39	P	Gardu la pacon	Grigorov	26
E	Resumo de la teorio de Antido	Opo	61	T	Gastejestrino (La)	Goldoni	49
T	Reto (La)	De Saussure	31	T	Georgo Dandin	Molière	24
S	Retoriko	Bukar	6	E	Gramatika karaktero de la		
N	Reveno	Lapenna	121		esperantaj radikoj	Kalocsay	14
H	revolucio de la Tasping-a ĉiela regno	? (Vietnamio)	5	I	Grete kaj Jep	?	16
T	Rikardo III	? (Ĉinio)	10	D	Gvidlibro por supera ekzameno	Pechan	41
P	Rimlitteroj	Ŝekspir	57	N	Gardeno de l' urbestro (La)	Gabrielli	37
P	Robaĵoj	Boulton/Auld	10	P	Ĝis nun	Lister	10
P	Robaĵoj (La)	Kajam/Auld	41	T	Hamleto	Ŝekspir	26
D	Roseroj	Kajam/Waringhien	32	D	Hai Son floroj	Fehanoj	5
R	Rozinjo	? DEV	19	E	Harmonio en la kontraŭdiroj	Harig	19
V	Saluton!	Gyula-Török	24	I	Hejmoj de birdoj	Ju-zi	13
RG	Sankta Biblio (La)	?	65	N	Hieraŭ, Hodiaŭ, Morgaŭ	Golden	35
P	Sankta Francisko		85	N	Hieroglifo	Pioro	26
BI	Schramm 'Albert)	Riabinin	41	E	Historio de Esperanto	Courtinat	70
S	Sciencaj komunikaĵoj 1978	?	36	I	Hund-bazaro	Opo	26
S	" 1982	Haszpra	28	P	Himeroj (La)	De nerval	34
S	" julio 1985	? UEA	16	T	Ifigenio en Taŭrido	Goethe	57
		SEC	24				

RG	Imitado de Kristo (La)	Hemerken	15	D	Lukto kontraŭ la analfabeteco	? (Vietnamio)	5
P	Infana raso (La)	Auld	45	P	Lumo de orienta Eŭropo	Beekman	10
T	Infero (La)	dante	120	I	Lutro kaj bufo	Ĝangtong	10
D	Instrua amuzo	Marček Markovič	14	P	Luzidoj (La)	Camoes	125
E	Internacia lingvo en Eklezio kaj mondo	Korythowski	60	F	Magia ŝipo	Ĉ.E°-E°	10
D	Islama respubliko (La)	Fabry	18	P	Malmalice	Valano	24
BI	Janusz Korczak	Szlazakowa	49	N	Malriĉaj homoj	Zsigmond Moricz	5
RG	Je la flanko de la profeto	Chiussi	89	D	Manifesto de la sennaciistoj	Lanti	16
T	Jozefo	Applebaum	24	G	Mapo de la Cina Popola Respubliko	Ĉ.E°-E°	10
V	Junulkurso	S.A.T.	35	D	Mia vivo	Ĉ. E°-E°	11
V	Junulkurso-Suplemento	S.A.T.	7	S	Manlibro pri ĵurnalismo	Junger-Maul	37
T	Justuloj (La)	Camus	20	R	Marta	Orzesko	30
R	Jaŭto veturas for... kaj veturigas la morton	Dorval	46	R	Materada	Fulvio-Tomiza	65
E	Kaj la ceter'... nur literaturo	Waringhien	107	F	Maks kaj Moritz	Busch	20
R	Kanako el Kananam	Linton	30	P	Memkritiko	sadler	16
R	Kara diablino	Boatmann	35	P	Merlo sur menhiro	Goodheir	36
N	Karnavalo	Gabrielli	22	V	Metodika demandaro	Baghy	6
V	Kato en la sako (La)	Kiskönyvtar	7	V	"METODO 10"	UFE	28
RG	Katolika preĝaro	I.K.U.E.	10	V	"METODO 11"	UFE	34
N	Kaukazaj rakontoj	Lermontov	14	V	"METODO 12"	UFE	36
N	Kaverno apud la maro	Potts	73	V	"METODO 15"	UFE	24
E	Kiel (mal)venkigi esperanton...	Kanguruo	9	R	Metropoliteno	Varankin	65
P	Kien la poezio?	Clark	30	E	1887 kaj la sekvo	Waringhien	89
I	Kies naztuko	?	3	N	Miriadoj da lumoj	? (Vietnamio)	5
R	Kit vivas	Lyngbirk	45	R	Misio sen alveno	Francis	65
R	Kiuj semas plotante	Eva Tofalvi	40	R	Mistero minora	Szilagyi	57
P	Klasika periodo (La)	Waringhien	65	N	Misteroj de la vivo	Bogh-Hogsted	23
I	Knabino Ginsengo	Jang-Cheng'an	10	N	Moderna kroatia prozo	Krtaliĉ	158
I	Kokido venĝis sian panjon	Ĝan Tong	10	S	Molekuloj	S.E.C.	25
N	Koko krias jam	Szilagyi	38	P	Mondo kaj koro	Kalocsay	30
I	Kolorigu	Ĉ.E°E°	37	R	Montara vilaĝo (La)	Chun-Chan-Yeh	49
P	Komuna kantareto	Opo	2	I	Morso-klubo	Fisker	21
D	Konsultlibro pri esperantaj bibliotekoj kaj muzeoj	Ĝivoje	34	P	Morto de la ĉielarko	Ady	21
R	Krado-mondo	Encarnacion	121	R	Mortsonoriloj de Chamblay (La)	Karolo Piĉ	140
P	Kvaropo	Auld	49	D	Muzika terminaro	Hill	5
R	Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo	Sekelj	25	R	Nekonata konato (La)	Boatman	20
RG	Langue internationale pour le monde et pour l'église (Une)	?	15	V	Neologisma glosaro	Vatré	18
D	Lanti pri sennaciismo	X	7	P	Ni devas vivi	Walraamoen	23
E	Laŭdacio por Waringhien	Haupenthal	9	D	Nia originala prozo	Apolloner	11
V	Legu kaj Ridu	Schmidt	9	N	Ni, homoj	Zora Heide	31
P	lenora	Bürger	14	I	Ni ludas	Riisberg	14
D	Lenz	Haupenthal	18	T	Ni ludas teatraĵon	Tvarozek	19
E	Letero al Emile Javal	Zamenhof	29	RG	Nobla Korano (La)	UEA	178
V	Lexique fundamental	Léger	10	R	Nokta flugo	Saint-Exupéry	22
FZ	Libro de la Amo (La)	Follereau	37	P	Norda naturo	Hilda Dresen	24
R	Libro de la romanoj	Benczik	34	V	Nouveau Cours rationnel d'E°	SAT	50
E	LI kaj NI	Haupenthal	178	RG	Nova testamento (La)	Brita Biblia S°	65
E	Lingva esenco de Esperanto (La)	Atanas	73	N	Noveloj	Lusin	37
V	Lingvaj anguloj	Baronnet	6	I	Nova vesto de la pupo	?	3
R	Litomiŝla tombejo (La)	Karolo Piĉ	130	P	Nuancoj	Szczurek	40
E	Logika bazo de vortfarado en Esperanto	De Saussure	13	B	Nudpieda Gen	Nakazawa Keizi	90
I	Longnazulo	Hauff	27	P	Obsedo	Karolo Piĉ	72
				E	Panoramo de esperanta literaturo	Ĝivoje	41
				I	Papilia fonto	Ĉ.E°-E°	10

nos cotisations 1987

17

Vous venez de recevoir notre bulletin d'information sur l'espéranto, "LA INFORMILO". Vous avez sans doute apprécié son contenu et vous désirez le recevoir régulièrement (4 numéros par an). A cet effet nous vous présentons ci-dessous les différentes cotisations 1987 et nous vous invitons à les payer dès maintenant.

Nous espérons vivement vous retrouver parmi nos abonnés ou nos membres!

Nous vous recommandons vivement de choisir votre cotisation à partir de la catégorie 3. Ce faisant, vous apportez votre adhésion et votre soutien à l'UNION FRANCAISE POUR L'ESPERANTO, association qui agit sur le plan national, tant dans le domaine de l'information en général que dans celui des relations avec les instances officielles. Vous concevez aisément que son efficacité et sa crédibilité dépendent essentiellement du nombre de ses adhérents.

COMMENT PAYER VOS COTISATIONS ET VOTRE ABONNEMENT

- 1/ Les cotisations à l'U.F.E. et à l'U.E.A. (catégories 3 et 4, colonnes encadrées) sont à payer directement à UFE, 4bis, rue de la Cerisaie, 75004 PARIS - CCP: 855 35 D PARIS, en y joignant votre bulletin d'adhésion. Votre adhésion à notre Fédération est comprise dans les cotisations de l'UFE, si vous habitez les départements 54 55 57 67 68 88. Par contre l'abonnement à LA INFORMILO reste à payer à notre Fédération. Voir ci-après.
- 2/ La cotisation à la FEDERATION CULTURELLE DE L'EST ainsi que l'abonnement à LA INFORMILO sont à payer:
 - = de préférence par virement postal à FEDERATION CULTURELLE DE L'EST POUR L'ESPERANTO
CCP: 1997 72 W NANCY (pratique et sans frais)
 - = par chèque bancaire à l'ordre de cette même Fédération... mais ce chèque est à envoyer à notre trésorier: A. GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM.
- 3/ Exceptionnellement, les membres du groupe de Strasbourg sont priés de verser leur cotisation au CENTRE CULTUREL ESPERANTO, CCP: 49917 STRASBOURG, en y ajoutant leur cotisation au groupe local (20), ou directement à leur trésorier, B. REIFFSTECK, 4, rue de Neuchâtel, 67000 STRASBOURG. Joindre votre bulletin d'adhésion spécifique pour les cotisations de l'UFE.


CAT. TABLEAU DES COTISATIONS 1987

- 1 = abonnement simple à LA INFORMILO
- 2 = adhésion simple à la FEDERAT. CULT. DE L'EST
 - * membre fédéral (avec abonnement à LA INFORMILO)
 - * membre fédéral (sans " ... pour les autres membres de la famille par exemple)
- 3 = adhésion à la FEDERATION et à l'U.F.E.
 - * membre simple
 - * membre abonné ACTIF (avec la revue de l'UFE, "FRANCA ESPERANTISTO")
 - * membre de moins de 30 ans (reçoit "KONCIZE" et
 - * membre abonné (conjoint) "JEFO informas")
- 4 = adhésion à la FEDERATION + U.F.E. + U.E.A.
 - * membre "individuel" (reçoit "Fr. Esp." + annuaire de UEA + la revue "KONTAKTO"... si moins de 26 ans)
 - * membre "individuel" (reçoit "Fr. Esp." + annuaire de UEA + revue mondiale "ESPERANTO" + revue KONTAKTO si moins de 26 ans)


	cotis.	abonnem. à LA INFORM ^o
	20 F	40 F
	20	40
	20	
	75	40
	195	40
	195	40
	95	
	227	40
	275	40
	395	40

IMPORTANT

- A - Tous les membres reçoivent la carte fédérale (s'ils sont nouveaux adhérents) et la revue trimestrielle régionale LA INFORMILO (... s'ils sont abonnés)
- B - Les membres de l'UFE et de l'UEA reçoivent en plus les cartes de membre de ces associations (s'ils sont nouveaux adhérents) et les coupons 1987 donnant droit au service des délégués mondiaux dont l'adresse se trouve dans l'annuaire de UEA.
- C - Les membres de l'Enseignement sont invités à mentionner leur profession; ils seront ainsi inscrits d'office au GROUPE DES EDUCATEURS ESPERANTISTES (G.E.E.)... sauf catégorie 2.
- D - Les jeunes gens de moins de 30 voudront bien mentionner leur date de naissance; ils seront ainsi inscrits d'office à l'ORGANISATION DE LA JEUNESSE ESPERANTISTE FRANC. (J.F.E.O.) sauf catégorie 2. Ils recevront alors en plus la revue "KONCIZE" et le bulletin interne national "JEFO informas".



distra angelo



KRUCVORT-ENIGMO

HORIZONTALE

1 Cefalopodoj. 2 Spice odora herbo - inklina suferigi (r) - pronomo. 3 Sovaga frukto - kroma planko. 4 Interteksi kromajn fadenojn - akva feo (r) - alta arbo (r). 5 Fortrañco de organo (r) - batali (r) - litero. 6 Ĝi estas 0,917 metron longa (r) - eraro de senso - sufikso. 7 procedo de dekoracio - bleki azene (r) - mara molusko (r). 8 Nombro - korpa membrano (r) - muzika verko por ekzercoj (r). 9 Herbo el kiu oni tiris bluan kolorsubstancan - umbeliferaco (r) - granda ŝtato (r). 10 Li kondukis kaleŝon (r) - multpieda krustulo (r) - pronomo. 11 Paŝkomputilo (r) - skeleto por juveloj (r). 12 Artefarita teksaĵo (r) - prefikso - arbo (r)

VERTIKALE = 1 Agrikultura maŝino - sankta bildo (r). 2 Adstringagusta - ĝi sucas sangon de mamuloj (r). 3 Blua kapo, griza dorso kaj ruĝa brusto (r) - tio necesigas plurposan stomakon (r) - en komparacio. 4 Orienta imperiestro (r) - kunfiksi metalajn pecojn (r) - inklino. 5 Rango, situacio - malsuprasipoparto (r). 6 Pentraĵo (r) - tiun urbon kantis fama aedo - sufikso (r). 7 Skrapo kampon - onomatopeo - neparhufulo (r) - prefikso. 8 Paro - familiano - scienco pri la moralo. 9 Ofte seka (r) - ardezo (r) - finaĵo - sufikso. 10 Ĝi moviĝas en sako (r) - orelstrigo (r) - eligi laŭtan voĉsonon (r). 11 Teknika sufikso - preskaŭ fakiro - senkompanse doni (r). 12 Ĝi havas tre flekseblan kolon - spasme elspiri - monero (r).

SILAB-ENIGMO

Pere de la ĉi-subaj alfabete ordigitaj silaboj malkovru la vortojn, kies difino troviĝas dekstre. La du "punktitaj" kolumnoj, vertikale legataj, elformas proverbon.

ab ac ar at es et ha ib ika ike in io is iso ka ko ko kro kso la lao lo lo lu mo
mo ni ni nio no no no no no omo ok per rio ru sen sul ta ta ta te te ti ti to tu tu
un up ŭzo va ve vej vo zi

1	malgranda rakonto
2	parto defilozofio
3	ceremoniaro
4	kialo
5	floro
6	longkrura birdo
7	aŭtokrata regnestro
8	japana matō
9	profundegaĵo
10	kalvulo
11	venenaĵo
12	ererero
13	aro da folioloj
14	ĉelmaterio
15	tubo
16	tubo
17	ne havanta similan
18	alojo el kupro kaj zinko
19	germana nilono
20	uzurpa landopreno
21	decembra bonulo

SOLVOJ DE LA LASTAJ ENIGMOJ

KRUCVORTENIGMO:

kerkedulo nub el rismo roso ritaro
blov oj agend frida ne tas koto agat
istm naz amelo nere io ol poĉi okarin
stiras kulp pot pugno armeo neur it
ĉio omar tineo oaz ne roko akv

"SILAB"-ENIGMO:

"Ne kredu al parolo senpropra kontrolo"

FINJARA KONKURSO

La unua leganto, kiu sendos al la redaktorejo la solvojn de la du enigmoj ricevos donece la verkon de Raymond Schwartz:

"Vole... novele"
